# Coronavirus kaj Bill Gates: Nerespondditaj demandoj




**Ekde la apero de la koronavirus', la nelogikaĵoj rilate ĝian originon kaj ĝian disvastiĝon levas multajn demandojn kaj estas temo de varmaj debatoj. Ĉi tiu elsendo traktas dubindajn korelaciojn inter koronavirusoj kaj la Bill & Melinda Gates Fondaĵo ...**

Nuntempe la tuta mondo atentas je la koronavirus'. Ekde la 5a de marto 2020 ĉiuj lernejoj kaj universitatoj en Italio estas fermitaj. Ĉiutage estas pli da malsanuloj, ferioj estas nuligitaj, ktp. Kla.TV pritraktis diversajn demandojn en sia elsendo en multaj lingvoj www.kla.tv/15760 : « Ĉu la koronavirus estas hazardo aŭ ĉu ĝi povus esti biologia armilo? »

La elsendo disvastiĝis kiel fajro en ĉiuj sociaj platformoj kaj nur post kelkaj tagoj, ĝi estis spektita de pli ol duonmiliono da homoj.
Nelogikaĵoj pri la origino kaj disvastiĝo de la koronavirus levas aliajn demandojn kaj estas varme pridiskutataj, ekzemple: "Ĉu Bill Gates antaŭe sciis pri la nuna pandemio?"
Efektive, ekzistas iuj korelacioj inter la koronavirusoj kaj la Bill & Melinda Gates Fondaĵo :
Sed aŭskultu mem
1. Koronavirus estas la ĝenerala termino por grupo de virusoj, sur kiuj diversaj institutoj faras esploradon kaj genetikajn modifojn.
La Instituto Pirbright, inter aliaj, havas patenton por unu el tiuj virusoj. Ĉi tiu instituto estas financata de la Bill & Melinda Gates Fondaĵo, inter aliaj. Laŭ sciencaj revuoj, patentoj gravas por eblaj vakcinoj.
Ĉu la Bill Gates Fondaĵo vere celas altruismajn celojn patentante koronavirusojn, aŭ ĉu povus esti, ke oni unue kreas problemon, generas reagon kaj poste ofertas solvon?
2. Bill Gates kaj lia Fondaĵo jam faris simuladon de koronavirus-pandemio la 18an de oktobro 2019 sub la titolo « Evento 201 ».
La simulado estis produktita kunlabore kun la John Hopkins Centro por San-Sekureco kaj la Monda Ekonomia Forumo en Nova Jorko.
La simulado temis pri la maniero laŭ kiu la politikaj decidantoj, aŭtoritatoj, industriistoj kaj prisanaj spertuloj kune laboras kontraŭ nekontrolata koronavirus'.
Scenaro de fikcia koronavirus-pandemio kun 65 milionoj da mortoj.
La kritikita John Hopkins Centro lastatempe publikigis deklaron sur ĝia ĉefpaĝo dirante, ke Ili ne antaŭdiris 65 milionojn da mortoj pro la nuna pandemio, eĉ se ilia ekzerco enhavis tute novan koronaviruson.
Ĉu tio estas koincido kaj konspiro-teorio aŭ ĉu ekzistas korelacio inter la 2019-koronavirus-epidemio, la koronavirus-patento kaj la ekzercado « Evento 201 » ?
3. La 18an de oktobro, la saman tagon, kiam la Bill Gates-Fondaĵo efektivigis la simuladon de koronavirus' 201, la malferma ceremonio de la Militaj Olimpikoj de 2019 okazis en Wuhan. Semajnojn poste, la unuaj kazoj de koronavirus' estis raportitaj proksime al la Wuhan merkato.
Artikoloj sur popularaj ĉinaj retejoj nun akuzas usonajn atletojn pri disvastigado de la viruso. La viruso estus kreita de la CIA por malfortigi Ĉinion. Fakte, la sportejo kaj la loĝejo de la 200 usonaj soldatoj estas nur je kelkaj kilometroj de kie ekis la epidemio.
Ĉu ĉio estis nur koincido kaj konspira teorio aŭ ĉu la 18-a de oktobro 2019 estis dato planita

por la komenco de tutmonda pandemio?
Kla.TV estas via kanalo por senpaga kaj necenzurita raportado. Ni pritraktas demandojn, kiujn la ĉefaj informiloj ne faras aŭ devas ne fari.
Dissendu ĉi tiun elsendon sur ĉiujn kanalojn, kiujn vi konas kaj sekvu Kla.TV sur la originala retejo ankaù en viaj naciaj lingvoj.

**de es**

---

### Fontoj:

http://www.centerforhealthsecurity.org/newsroom/center-news/2020-01-24-Statement-of-Clarification-Event201.html
http://www.centerforhealthsecurity.org/event201/
https://www.globalresearch.ca/china-is-confronting-the-covid19-epidemic-was-it-man-made-an-act-of-of-bio-warfare/5705067
https://nuoviso.tv/steinzeit/die-rote-pille/corona-virus-doomsday-oder-panikmache/

---

### Ankaŭ tio povus interesi vin:

#Kronaviruso - www.kla.tv/Kronaviruso

#BillGates-eo - www.kla.tv/BillGates-eo

#PlejSpektitajFilmetoj - spektitaj filmetoj - www.kla.tv/PlejSpektitajFilmetoj

---

**Kla.TV – Novaĵoj alternativaj ... liberaj – sendependaj – necenzuritaj ...**

- Tio kion la amaskomunikiloj devus ne kaŝi ...
- Tio pri kio oni aŭdas malmulte, de la popolo por la popolo...
- Regulaj informoj ĉe www.kla.tv/eo

Indas resti ĉe ni!

**Senpaga abono al nia retpoŝta informilo ĉi tie:** **www.kla.tv/abo-en**

---

### Sekureca Avizo:

Kontraŭaj voĉoj bedaŭrinde estas pli kaj pli cenzuritaj kaj subpremitaj. Tiom longe kiom ni ne orientiĝas laŭ la interesoj kaj ideologioj de la gazetara sistemo, ni ĉiam sciu, ke troviĝos pretekstoj por bloki aŭ forigi Kla.TV.

**Do enretiĝu ekstere de interreto hodiaŭ! Klaku ĉi tie:** **www.kla.tv/vernetzung&lang=eo**

---

*Licenco: Licence Creative Commons kun atribuo*

Oni rajtas distribui kaj uzi nian materialon kun atribuo! Tamen la materialo ne povas esti uzata ekster kunteksto. Sed por institucioj financitaj per la aŭdvida imposto, ĉi tio estas permesita nur kun nia interkonsento. Malobservoj povas kaŭzi procesigon.